7-a JARO, N-o 322

LEIPZIG, 4. / 12. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO


OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

PRI LA BRAZILIA REVOLUCIO

En la lokaj gazetoj oni jam ĉie estos leginta pli malpli detale pri la revolucio okazinta dum oktobro en Brazilio, tiel ke verŝajne mi eĉ ne kapablus doni novaĵojn pri ĝi. Mi do limigas min doni ĉi tie kelkajn koncizajn rimarkigojn.

La 3. oktobro oni eksciis, unue nur onidire, ke en Minas-Ĝerajso "armita movado" estis eksplodinta, ke la ŝtatan prezidanton oni estis malliberiginta k ke la ĉefurbo Bela-Horizonto k diversaj aliaj urboj estas en la manoj de l' revoluciuloj. Parenteze ankoraŭ kelkaj gazetoj aldonis, ke en ĉiuj aliaj partoj de Brazilio regas plena trankvilo k ke oni ne kredu dissemiĝantajn famojn pri samtempa revolucio en la plej suda brazilia ŝtato, Rio-Grando Suda. La sekvantan tagon tamen la revolucio en la sudo elmontriĝis vera k oni ankaŭ sciigis la nomojn de l' gvidantoj, inter kiuj estis la generalo Isidoro Lopes, kiu en julio 1924 ĉefis la revolucion malsukcesan en San-Paŭlo. Federitaj k ŝtataj trupoj estis sendataj kontraŭ Minas-Ĝerajson k Rio-Grandon Sudan, la registaro dekretis sieĝan staton k gazetaran cenzuron en tuta Brazilio k fermiĝon de la bankoj — krom por iuj tre urĝaj aferoj — ĝis la 16. oktobro. La mastrumada krizo, kiu jam de pli ol unu jaro regas en la lando, kompreneble ne malkreskis per la revolucio; se antaŭe jam industrio k negoco estis tre malviglaj, nun ili preskaŭ tute ĉesis, krom en tiuj branĉoj, kiuj traktas neprajn vivbezonaĵojn. Kelkaj entreprenoj tute fermis siajn pordojn aliaj ankoraŭ pli reduktis la dungitaron aŭ la laborhorojn; kelkaj ankaŭ reduktis la salajrojn. En la firmo, en kies oficejo mi laboras, oni jam je la fino de septembro sen antaŭavizo deprenis 15 elcentojn de ĉiuj salajroj "pro la mastrumada krizo" k la 19. oktobro, en la lasta momento antaŭ hejmeniro, oni prezentis al ĉiuj dungitoj cirkuleron, laŭ kiu ĉiuj salajroj estis reduktitaj je 50 (kvindek) elcentoj kun retroefiko de l' unua de oktobro. Ĉiuj tuj devis subskribi por montri sian konsenton, nur du preferis ne subskribi k forlasis la firmon.



Brazilio: S. Tereza-urbkvartalo en Rio-Ĵanero

Pri la celoj de l' revolucio oni sciis nenion certan; la gazetoj, severe cenzurataj k ricevante publikigordonojn, skribis pri tio aŭ nenion aŭ malbonaĵojn k kalumniojn. Kelkfoje ankaŭ disvastiĝis la famo, ke la sudaj ŝtatoj intencas apartiĝi de la cetera Brazilio. Per afiŝoj en la urbo oni eĉ disvastigis avizon, ke la revoluciuloj estas en interligo kun Sovetio k ricevas subtenon de tie. Ankaŭ en la du ŝtatoj Santa-Katarino k Paranio, kiuj kuŝas inter Rio-Grando Suda k San-Paŭlio, oni ribelis, kvankam la registaro prisilentis tiun fakton laŭeble.

Tri semajnoj pasis k laŭ la gazetoj la revolucio estos baldaŭ subpremita; laŭ aldona dekreto la bankoj devos resti fermitaj ĝis la 30. novembro. La ĝenerala animstato estis premita. Pro radioraportoj kaptitaj k pro diversaj aliaj famoj oni ne kredis pri la baldaŭa venko de la federa registaro. La gazetoj konstante skribadis pri venkoj k antaŭeniĝoj de lojalaj trupoj, sed kiu sekvis la loknomojn de la bataloj sur landkarto, tiu konstatis antaŭeniĝon de la revoluciuloj. Tamen eĉ je 24. oktobro la matengazetoj ankoraŭ asertis, ke la registaro firme estras la situacion, kvankam laŭ informoj nun ricevitaj la potenco de la federa registaro jam post la deka tago de l' revolucio limiĝis nur ankoraŭ al iuj partoj de San-Paŭlio k Rio-Ĵanerio, dum preskaŭ en ĉiuj aliaj partoj de Brazilio la revoluciuloj jam estris. Tiun tagon posttagmeze je la 13,30 h. subite disvastiĝis fulmrapide sciigo, ke la oficiraro de l' lojalaj trupoj k marsoldatoj detroniĝis la prezidanton Vaŝington Luis k liajn ministrojn k proklamis provizoran revolucian registaron. Ŝajnas, ke tiu informo venis al San-Paŭlo telefone k post la trisemajna premiteco la animoj treege eksplode liberiĝis, tiel ke la San-Paŭlia registaro fuĝis preskaŭ senreziste. Tuj grandega ekscito ekregis k tumultoj rezultis, tiel ke ĉiuj negocejoj ekfermis. Amasoj da homoj komencis ataki la diversajn gazetojn, kiuj estis ĉiam mensogintaj k kalumniintaj pri la revolucio.

Vera orgio de vandalismo nun okazis, kiu atingis sian plej febran staton sabaton, la 25. oktobro. La polico ne estis videbla k neniu klopodis trankviligi aŭ malhelpi la senbridajn amasojn, kiuj perforte enpenetris la preslaborejojn, detruis ĉiujn maŝinojn k elĵetis ĉion forŝireblan tra la fenestroj sur la straton, en kies mezo oni ekbruligis la rubaĵon. En kelkaj preslaborejoj oni ekbruligis eĉ la internan ekipaĵon. Estis vere stranga bildo: densega homamaso staras duonronde antaŭ la domo, kies

fenestroj estas ĉiuj rompitaj; k en la fenestroj ekaperas jen seĝo, jen skribotablo, jen vestostablo, jen skribmaŝino k eĉ fortepiano, k kun grandega krako la objektoj disrompiĝante alvenas sur la pavimon, kelkfoje el kvaretaĝa alto. Ĉiufoje, kiam alvenas nova peco, surdiga aplaŭdo de la ĉirkaŭstaranta amaso aŭdiĝas k malgrandaj objektoj ĉiuspecaj, precipe amasegoj da papero leterkolektiloj, libroj, kajeroj, tutaj arkivoj — konstante akompanas la "alteriĝon" de la grandaj objektoj, dum diligentaj manoj ĉiam denove nutras la flamojn sur la stratpavimo. Tiel oni detruis en San-Paŭlo ses grandajn gazetojn (interalie ankaŭ la italan k la germanan), du klubejojn k grandan nombron da loterivendejoj, da kiuj en la urba centro oni renkontas almenaŭ unu ĉiujn cent paŝojn. La lastajn oni detruis pro la ega hazard-ludado kontraŭleĝa, kiu okazadis en ili dum la lastaj jaroj, kaŝe tolerite de la registaro. Nur unu loterivendejo savis sin de tiu sorto per grandlitera avizo super la pordo: "Tie ĉi oni neniam hazardludis!", kies veron tamen multaj pridubas.

Ankaŭ en aliaj urboj tia vandalismo regadis. En Kampinas la amaso detruis la episkopan sidejon, ĉar la episkopo antaŭ nelonge estis preĝinta por la venko de la federa registaro. Grandaj valoroj kompreneble detruiĝis per tio, ĉar kompost- k presmaŝinoj ne estas malkaraj objektoj. Sole da kompostmaŝinoj oni detruis en Rio-Ĵanero k San-Paŭlo cent kvindek k asekuro kompreneble ne estos pagata por tiaj detruoj.

En marto ĉi-jara okazis balotado por la prezidanteco brazilia k la ĉefaj kandidatoj estis la ĝisnuna prezidanto de San-Paŭlio, Julio Prestes, k tiu de Rio-Grando Suda, Ĝetulio Vargas. La balotoj venkigis la unuan, sed onidiroj ĉirkaŭvagis pri trompoj k falsoj, k tion konfirmas la revoluciuloj, kies ĉefo estas Prezidanto Ĝetulio Vargas de Rio-Grando Suda. Li do nun avizis la provizorajn regantojn militistarajn en Rio-Ĵanero, ke li agnoskos ilin kiel helpantojn en la revolucio, sed ke li postulas la prezidantecon brazilian; tion ili akceptis. Li venos al San-Paŭlio k Rio-Ĵanerio k per siaj trupoj pace okupos tiujn ĉi teritoriojn por sekurigi la revolucion; ĝis ia grado li malfidas la generalaron Rio-Ĵaneran k San-Paŭlan, ĉar dum la tutaj tri semajnoj de l' revolucia batalado, ĝis antaŭ kelkaj tagoj, ili neniel estis hezitintaj batali kontraŭ li. Tamen verŝajne nun la paco revenos k multaj esperas grandajn plibonigojn en la popola mastrumado brazilia. Estas malfacile antaŭdiri la sekvojn de l' revolucio. Se la revoluciuloj plenumos la taskon proklamitan, nome radikale forbalai ĉiun korupton tiom vaste regintan dum la lastaj dek jaroj aŭ pli, tiam ili estos atingintaj grandegan sukceson. Sed ĉu sub kapitalisma reĝimo korupto estas ekstermebla? Kaj la ĝeneralan mastrumadan krizon regantan ne nur tie ĉi, sed pli malpli en ĉiuj landoj, ankaŭ tia sukceso ne povus forigi, kvankam certe ĝi kapablus plimildigi ĝin. La kancero sufokinta k minaceginta la mastruman organismon estus eltranĉita k la paciento eksteraspekte resaniĝus; sekvus periodo de relativa sano k prosperado. Sed la ĝermo de l' socia kancero, la malegala distribuo de la grundo k aliaj vivtrezoroj, ja enrestus k pli malpli frue denove kreskos; novaj febroj, novaj krizoj sekvos, ĝis oni trovos rimedon, ne nur por eltranĉi la absceson, sed forigi radikale ĝiajn ĝermojn. Ĝis kiam?

27. okt. 1930.

Haro Petrido, San-Paŭlo (Brazilio).

EL ISLANDO

Kvankam ni preferas originalajn raportojn, ni escepte enmetas ĉi tiun tradukon, tial ke el tiu lando ni ĝis nun preskaŭ neniam ricevis artikolojn, kiuj informus niajn legantojn pri la tiea situacio. *Red.*

Entreprenoj publikaj k privataj

Isafjordo estas urbeto kun ĉ. 2300 loĝantoj. Ĝi estas lokita sur nordokcidenta bordo de Islando. En la jaro 1921 la socialistoj unue atingis plimulton en la urbestraro, k tio estis la unua fojo en la islanda historio, ke elektiĝis socialistoj por administri komunumajn aferojn en iu urbo.

La socialista urbestraro en Isafjordo sin tuj



montris sufiĉe taŭga k prizorgis la bonon de la urbeto kun ne malgranda sukceso. La socialistoj ankaŭ tenas ĝis hodiaŭ sian plimulton kun ĉiam pli forta apogo de l' elektantaj laboristoj.

Dum tiu ĉi jardeko la urbestraro interalie aĉetis por la komunumo plimulton de la liberaj grundoj, kiuj sub la malnova reĝimo kompreneble fariĝis privataj posedaĵoj. Ĝi konstruis grandan kajon komunuman, modernan hospitalon k maljunulejon, plibonigis k pligrandigis la popollernejojn k urbobibliotekon k starigis komunuman kinon. Ĝi ankaŭ fondis k funkciigas komunuman bovfarmadon. Krom tio la socialistoj en Isafjordo, per iniciato k sub gvidado de la socialistoj en la urbestraro fondis kooperativan komercejon, k kiam la fiŝkaptado, la baza vivrimedo de l' urbanoj, bankrotis en manoj de l' privataj entreprenistoj, la socialistoj restarigis ĝin per koopera societo, kiu post dujara ekzisto jam fariĝis la plej granda entrepreno de sia speco en okcidenta parto de la lando.

Kompreneble tiuj ĉi faroj de la socialistoj ne efektiviĝis sen bruado de l' kontraŭuloj, k ne mankis malbonaj antaŭdiroj, ke la socialistoj bankrotigos la urbeton. Ĉiuj iliaj entreprenoj estis kalumniataj tra la tuta lando. Sed ĉiuj tiaj antaŭdiroj montriĝis falsaj. La urbeto Isafjordo neniam tiel bonstatis kiel nun.

Sekvanta artikolo, tradukita el la organo de l' socialistoj en Isafjordo, estas ĝenerala rebato kontraŭ la kalumnia militirado de la konservativuloj. Ĉiuj ekzemploj menciitaj estas prenitaj el la urbeto mem. Eble la artikolo estas sufiĉe interesa por laboristoj ekster nia lando. Kredeble la aŭtoro estas unu el la socialistoj en la urbestraro.

ISLANDANO

Disputaĵo. Publikaj entreprenoj k la socialismo

Nuntempe oni ne disputas alion pli multe ol publikan k privatan entreprenojn. Ambaŭ estas komparataj, pesataj k mezurataj. Tio estas la ĉefa disputaĵo inter la konservativaj k la pli liberalaj partioj.

La socialistoj tion pridisputas inter si. Iuj el ili rigardas multajn el la publikaj entreprenoj kun granda suspekto, opinias, ke ili estas novaj flikaĵoj sur malnova vesto, nur kapablaj plilongigi mizeran vivon de trae malmorala socio, por devojigi la laboristaron, kiu estas de la sorto elektita por krei novan socion sur ruinoj de l' malnova, k por tiom blindigi plej multajn gvidantojn de la socialismo, kiuj batalas por tiuj ĉi entreprenoj aŭ rilatas al ili, ke ili perdas la vidon je la ĉefa celo, pasigas la tempon per eta, sensignifa fuŝado k forgesas la solan necesaĵon.

Sed spite ĉio oni povas ne malkonfesi, ke publikaj entreprenoj por ĝenerala bono jam konvinkis pli ol ĉiuj predikoj k sciencaj disertoj, ke la socialistaj tezoj pri la estonta sociordo estas bazitaj sur racia fundamento k ke la revolucio, kiu nun minacas al ĉiuj regnoj k ne estos evitebla per vortoj nek konsiderinde prokrastebla per bagatelaj reformoj, — malplej per tiuj, kiuj staras kiel oficialaj protestoj kontraŭ la reganta ordo, — ne bezonas estiĝi fino de ĉiu kulturo, sed male komenco de nova k pli perfekta kulturo k io simila al tio, kion la plej grandaj profetoj k saĝuloj de l' homaro prirevis k predikis.

Malfacila pozicio en kapitalista socio

Supereco de publika entrepreno super la entreprenoj privataj k ĝia valoro kiel silenta predikado pri avantaĝo de l' socialismo fariĝas pli evidenta, kiam oni konsideras, kiel lame ĝi devas stari en kapitalisma socio.

Malofte al ĝi estas permesate klopodi pri aliaj entreprenoj ol tiuj, per kiuj la profito malsukcesis al la privatuloj.

La regantoj de la landoj ĉiam estas

pli malpli malamikaj al la pensmaniero, kiu estas necesa kiel bazo por ĉiuj tiaj entreprenoj, k kun treege malmultaj esceptoj ili estas metataj sub estrado de tiuj, kiuj laŭ sia vivkoncepto k tuta karaktero devas fari ambaŭ: malami k abomeni la entreprenojn, sed sin okupas pri ili nur pro tio, ke ili tie rikoltas sian vivtenkoston.

Ĉiuj publikaj entreprenoj, kiuj bezonas kapitalon, devas sin submeti al favoro de estroj de l' kapitalo, burĝoj k bankdirektoroj, kiuj plej versimile faras al ili ĉiun elpenseblan malutilon.

La pensmaniero de l' publiko mem infektiĝas de la reganta ordo, kie la plej grava leĝo estas, ke ĉiuj batalu kontraŭ ĉiuj k ke ĉiu pensu pri sia propra gajno, sen ia atento pri tio, kian malbenon ĝi povas kaŭzi al publiko, k estas malgranda helpo trovebla ĉe la amaso.

Oni povas diri, ke al ĉiu publika entrepreno por ĝenerala bono en kapitalisma socio minacas la danĝero, ke ĝin ĉirkaŭos k travenenos ĉia malmoralo, kiu estas por ĝi tiom granda danĝero el socialisma vidpunkto, kvankam tio estas konsiderata kiel bona, valora k honesta komercmoralo de l' burĝoj, superaj k malsuperaj.

Ke diversaj publikaj agadoj k entreprenoj spite ĉio tio lumas kiel flamantaj torĉoj antaŭen al supera k pli perfekta ordo, tio plej bone montras ilian gigantan superecon.

Malfacila komparo

Kiam oni komparas publikajn k privatajn entreprenojn, tiam la unua estas en tre malbona situacio ĉe la komparo mem. Plej multaj publikaj entreprenoj estas pli ol laŭnome publikaj. Ili estas praktikataj antaŭ la okuloj de ĉiuj k plej ofte estas facile por ĉiuj observi ilian funkciadon k tutan aranĝon. Precipe oni brue reklamas iliajn mankojn, kiujn oni distrumpetas en gazetoj k kunvenoj, por malestimo al la entreprenoj, k por teruri k averti la publikon, por ke ĝi ne postulu pli multe da simila.

Aliflanke la privataj entreprenoj, kiuj estas komparataj kun la publikaj, estas praktikataj kun tiel granda sekreto, kiel la posedantoj aŭ direktoroj deziras. Precipe oni zorge kaŝas ĉiujn mispaŝojn k despli abomenojn k krimojn, sed tion, kio bone sukcesas, oni malkovras antaŭ la publiko, por laŭdo al la sistemo k por gloro al la burĝoj.

La privataj entreprenoj do plej ofte similas al "tomboj blankigitaj, kiuj ekstere ŝajnas belaj", k estas nur pro malatento, hazardo aŭ akcidento, se la ŝtonoj tiel leviĝas, ke la eksteruloj povu enrigardi k vidi, ke ili "interne estas plenaj de ostoj de mortintoj k de ĉia malpuro".

Sed eĉ tiun ĉi danĝeron la burĝoj priatentis, encerbigante al la publiko la opinion, ke privataj entreprenoj tute ne koncernas ĝin, ke estas nedeca malĝentilo k malbona konduto tuŝi tion, kio tie ne sukcesas, kiom ajn okulfrapa ĝi estas, k ke tiuj ne konas bonajn morojn, kiuj tion faras, k por plia sekuro oni minacas la kritikantojn per procesoj k aliaj diablaĵoj.

Kvankam privataj entreprenoj praktikas ĉiuspecan, senhontan hazardludon, eĉ uzante ŝparmonon de la tuta popolo aŭ disdividante la perdojn sur kurbajn dorsojn de la laboristoj, ili devas sin klini pli profunden, toleri k silenti.

Kiam la publikaj entreprenoj estas oficiale mallaŭdataj k kalumniataj en la komparo kun la entreprenoj privataj, estas kalkulata blasfemo aludi la kulpojn de la lastaj, ĉar ili estu privata afero, ne koncernanta la publikon.

(Finota.)

Pri la "balotoj" en Polio

Antaŭ la balotoj la registaranoj (BBWR=Senpartia Bloko de kunlaborado kun la registaro) diris, ke ili devas havi plimulton por povi ŝanĝi la konstitucion, kvankam ĝi nun estas nur surpapera. Efektive ne temis nur pri la konstitucio, sed pri plifirmigo de la faŝista reĝimo sub demokrata masko. Kaj jen kiel okazis la balotoj: Antaŭ k dum la balotoj regis la plej bruta teroro. Oni malpermesis la maldekstrajn listojn ŝtatajn k distriktajn imitante Finlandon, fermis la presejojn, konfiskis la balotliteraturon, malliberigis la gvidantojn k ĉiujn aktivulojn, kiel ekz. en Varsovio ĉiujn profesi-unuiĝajn gvidantojn de maldekstraj prof-unuiĝoj. Ĉiutage okazis traserĉoj, dum kiuj la fiagentoj policistaj subĵetis komunistajn alvokojn por tiele povi akuzi je "kontraŭŝtata agado". Nur la registara partio povis alglui afiŝojn, kiuj restis netuŝitaj. La afiŝojn de aliaj partioj la policistoj havis ordonon deŝiri k tuj je tiu loko alglui registarajn. En ĉiuj balotejoj pendis registaraj afiŝoj, k oni disdonis registarajn balotilojn, kvankam laŭ la konstitucio ĉi tio estas severe malpermesata k punota per malliberigo ĝis 5 jaroj. La deziregata de burĝaro "forta mano" elmontriĝis en plena lumo. Bedaŭrinde la laboristoj suferantaj mizeregon sub ekonomia k politika teroro estas indiferentaj al ĉi tiuj atakoj de venkanta faŝismo.

	mandatojn
La registara bloko BBWR ricevis . .	248
Naciaj demokratoj N. D.	64
Ukrainoj k blankrusoj burĝaj (ĉar lab. k kamparanaj malpermesataj)	21
Germanoj (burĝaj)	5
Judoj (burĝaj)	7
Kristan-demokratoj	14
„Centrolew", bloko de socialdemokratoj kun kamparanaj partioj k unu "flava" laborista "ŝtatfidela"	79
Komunistoj	6
Sume:	444

D. L. (16 674), Polio.

POST JARFINO

ne multaj Sovetianoj plu ricevos "S-ulon", **se** vi ne aktive helpos al ili pagante help-abonon al **Administracio en Leipzig!**

Post la parlamentbalotoj en Aŭstrio

Laŭ mia promeso en n-o 319 mi parolas pri lastdataj okazoj en Aŭstrio. Grandan seniluziiĝon suferis la faŝistoj, kiuj esperis, ke la balotoj substrekos la faŝisman registar-tendencon k helpus tiel al ili en iliaj malnoblaj celoj. Sed la voĉdon-rezulto estis jena:

Socialistoj 1 517 603 voĉoj (72 elektitoj), kristansocia partio 1 303 608 voĉoj (67 elektitoj), Ŝoberpartio (kamparanoj, burĝnaciistoj) 449 445 (19 elektitoj), faŝista partio 228 338 voĉoj (8 elektitoj), komunistoj 20 879 v., demokratoj 6719, rent-interesitoj 12 638, juda partio 10 845, nacisocialistoj 108 445, monarkistoj 157 voĉoj (neniuj elektitoj).

La balotoj rezultigis por la socialistoj pligrandigon je unu plia parlamentano. Tiun ĉi pluson ili gajnis en la ruĝa Vieno, kie eĉ en burĝan medion penetris la simpatio por la modela administrado de l' socialistoj. La faŝistoj, kiuj ĉiam fanfaronis pri sia popolmovado kiel ventego forpelonta la ruĝulojn el Vieno, montriĝis tute sensignifaj, k se la ĉefa burĝa partio ne estus subtenanta ilin, la movado baldaŭ mortus. La kristansocia partio, kies ĉefgvidantoj intencis uzi la faŝistan movadon por siaj intrigaj celoj, estis la ĉefa venkito en la balotoj. Kvankam oni per plej fiaj rimedoj agitadis kontraŭ la socialistoj, intencinte provoki la laboristaron per la subita senarmigo de l' respublika Ŝirmligo (laborista defendorganizo), la klerikal-faŝistoj tamen fiaskis. Venkita morale estas la klerikal-faŝismo — ĉu ankaŭ laŭ potenco?

Al. Ramŝak.

Vi ne plu bezonas

vane rompi al vi la kapon pri la senco de tiu aŭ alia vorto, de kiam ekzistas la

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

Volumo de 536 pĝ. en formato 14×20 cm.

Prezo: bindita ekzemplero 10 mk. g. afrankite

broŝurita „ 9 „ „ „

Nur por aktivaj membroj (t. e. membro-abonantoj) de SAT validas rabato de 20 % je tiu ĉi verko.

Mendu ĉe Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 aŭ Direkcio de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

La itala faŝismo volas konkeri la mondon

Musolini deklaris en sia lasta parolado: "Mi asertas, ke la faŝismo, kiel ideo, doktrino, realigo, estas universala. Itala en sia aparta institucio, ĝi estas universala en sia spirito k ne povos esti aliel. La spirito estas universala per sia naturo mem. Oni do povas antaŭvidi Eŭropon faŝistan: Eŭropo, kiu solvos, en la senco de l' faŝismo, la problemojn de l' moderna ŝtato, de l' ŝtato de l' dudeka jarcento, tre diferenca de l' ŝtatoj, kiuj ekzistis antaŭ 1789 aŭ kiuj formiĝis poste. La faŝismo respondas hodiaŭ al postuloj de universala karaktero."

Dume italoj daŭrigas forkuri trans la alpojn riskante perei pro frosto, neĝo k glacio, k esti mortpafataj de limĝendarmoj; ĉar la vivo en Italio fariĝis netolerebla por ili. *Laŭ "Italia".*

El la kroniko de l' finlanda reakcio

La militrifuzanto k prezidanto de l' Kontraŭmilita Ligo en Finlando, Pekurinen, post sesmonata restado en malliberejo estis eskortata je 4. septembro al sia garnizono, sed sukcesis helpe de amikoj forkuri. Iun tagon dek "Lappo"-faŝistoj forrabis lin, kondukis en arbaron k bategis lin, minacante lin per mortigo, se li daŭrigus rifuzi militservon.

Korekto. La artikolo "Sciigoj el Teraso", presita en n-o 319, estas verkita de *SAT-ano 15 043* (ne 15 042!). Legantoj bonvolu noti.

Protestkunvenoj kontraŭ ellivero de fremduloj

Du hispanaj laboristoj, Pons k Blanko, kiuj dum la diktatur-periodo de Primo de Rivera estis kondamnitaj pro laŭdira partopreno ĉe armita batalo inter policanoj k sindikatistoj, *kvar jarojn post la okazo,* je dumviva enkarcerigo, sukcesis forkuri al Francio, kie ili nun estas enkarcerigitaj. Nur pro multnombraj protestkunvenoj la franca registaro ĝis nun ne riskis ellivери tiujn du K-dojn al la hispana diktatoro. La "Komitato por Socia Defendo" agitas por atingi ilian liberigon.

Atako al virinmanifestacio en Japanio

Okaze de kunveno de 8000 virinoj, kiuj manifestaciis por la malpliigo de l' laborhoroj, la polico k pluraj centoj da membroj de kontraŭrevolucia organizo faris atakon. Multnombraj vunditoj estis sur ambaŭ flankoj.

Antimil. Servo.

Por "savi la kamparon" (Japanio)

La terposedantoj k burĝoj, minacataj de la revolucia aktivo de l' malriĉaj kamparanoj tra la tuta lando, k sekve devigataj sin defendi k savi, "en maltrankvilo pri la paco k ordo de la ŝtato ĉe granda krizo en nialanda ekonomio" kunvokis je 25. aŭgusto en Tokio kunsidon kun ĉ. 700 partoprenantoj el urboj k vilaĝoj de la lando, kiu decidis komenci unulinie la movadon por "savi la kamparon".

Pligrandigo de l' aera armeo en Japanio

Ankaŭ Japanio, kiel la ceteraj imperiistaj potencoj, faris projekton pri pligrandigo de la aera armeo kun buĝeto de 200 milionoj da jenoj (1 jeno = ĉ. ½ dolaro). Laŭ tiu projekto la aviad-armeo konsistos anstataŭ el 17, kiel nun, — el 33,5 regimentoj, t. e. duobligo proksimuma. La nombro de surŝipaj aeroplanoj estos 200, t. e. duobliĝo. En Jokosuka, milithaveno, estos instalita eksperimenta fabriko. Oni projektas en decembro aranĝi stabmanovron pri aerodefendo de la ĉefurbo.

Laŭ Scienco Proleta, n-o 11.

For la faŝismon! (Hispanio)

Leviĝas la proletoj en Hispanio, k la tuta lando estas kvazaŭ batalkampo. Dum kelkaj horoj la komunistoj en Hispanio troviĝis en la fajro de l' pafiloj. Ĉiuj batalis kiel herooj. Nur la proleta klaso kontraŭstaras la diktaturon. La laboristaro komprenas, ke la komunistoj klopodas venki la faŝismon, la novan diktaturon. Jam ne plu povas triumfi kiel en 1923 la faŝismo pro la kontraŭbatalo de l' proletoj. La 7-jara diktaturo estas pasintaĵo. Ni estas ekpretaj batali en la stratoj por la libero de Kataluna k Hispana Respubliko[1].

(15 412)

[1] Tiu ĉi letereto spegulas la animstaton de l' hispaniaj proletoj en nuna epoko. Pri la faktoj mem, la stratbataloj en Barcelono, Madrido k. a. urboj, niaj legantoj estas informitaj per la ĉiutaga gazetaro. — Red.

Memoro je la 15-a de julio en Vieno

Fino.

(Vidu n-ojn 312, 313 315, 316, 317, 318, 319, 320, 321)

La socialdemokrata partio de Aŭstrio havas gravan respondecon antaŭ la amasoj. Ĝi ne povas nebezone instigi al malamo nek al venĝo kontraŭ la polico, ĉar ankaŭ inter la policanoj estas sendube multaj bonaj homoj. Tia instigado povus facile estigi malordojn k sangverŝadon. Tion mi bone komprenas k konsideras. Sed inter postulo pri justo, pri justa, meritita puno al multaj centoj da murdistoj k instigo al venĝo estas grandega diferenco!

Mi ankaŭ ne volas kaŝi, ke la nuna aŭstria presleĝo tre malfaciligas tiun taskon k pretekste oni almenaŭ provus, certe eĉ farus akuzon kun monpuno pro tia publikigo en partia socialdemokrata gazeto. Mi tutplene agnoskas la grandegan malfacilon, kiu regas en la klerikala, nigrega Aŭstrio rilate al sinturno al eksterpartiaj sferoj, ĉu per afiŝado, ĉu per aliaj rimedoj.

Sed estas mia persona konvinko, ke oni almenaŭ estus jam multe pli proksima al la efektivigo de l' konsciigo de l' popolo, se la socialdemokrata partio laŭmerite subtenus Karlon Kraŭs en lia kulturpionira noblega k abnegacia batalo kontraŭ la fikrimularo k murdistaro de l' 15-a de julio 1927. Por rebonigi tiun ĉi maljuston, formiĝis inter la socialdemokrataj admirantoj al Karlo Kraŭs la "Unuiĝo Karlo Kraŭs", kies celo estas tiom longe agadi, ĝis la kvankam senpartia, tamen revolucia artisto k verkisto, al kiu ankaŭ la aŭstria proletaro ŝuldas grandegan dankon, estos laŭmerite traktata.

Sendube multaj Gek-doj, kiuj iam estis en Aŭstrio aŭ komprenas la germanan lingvon, scias, kion signifas la germana vorto: "Gemütlichkeit" (elparolu: Gemitliĥkajt). Esperanten tradukite ĝi signifas eble: bonkora (sentimenta) gajo. Kiel tiom da aliaj mensogoj, kiujn oni disvastigas en la mondo, oni disfamigis dum multaj generacioj k ankoraŭ hodiaŭ, ke tiu "gemitliĥkajt" estas ĉefa, plej distinga eco de la aŭstra gento, eco, kiu en tia abundo ne estas renkontebla en aliaj mondpartoj.

La 15-a de julio 1927, kiu montris al mi tiom da aŭstroj, inter ili sendube multaj, taksataj kiel "gemitliĥ", malgraŭ tiom da bonkora gajo, plej fie, antaŭmedite, malvarmsange, *absolute senaverte k senbezone, tute senkaŭze* murdantaj, kripligantaj k fitraktantaj pacemajn, senkulpajn homojn, klarigis al mi, ke la famo pri speciala aŭstra gaja bonkoreco estas trompo k mensogo. Tiu eco ne estas aŭstra specialaĵo, kiel oni volas kredigi al la mondo. Tiu kvalito ĉie en la vasta mondo ekzistas samgrade, tie aŭ alie eble eĉ en pli alta grado.

Sescent surĉevalaj k piedirantaj policanoj portis pafilojn la 15-an de julio. Pri la piediraj pafilportantoj oni povas laŭprotokole k cetere per nepridubeblaj atestoj de memspertintoj diri sen ia troigo, ke inter ili, se ne ĉiuj, tamen la grandega *plejmulto* (*ne* nur plimulto) fiagis murdante senbezone, senaverte. Sed jam *antaŭ* la disdono de l' pafiloj rajdantaj policanoj senbezone murdis, vundis k kripligis. Ankaŭ piediraj policanoj *antaŭ* la pafil-disdono *senbezone, senaverte* revolvere pafadis en la amason. Plue

Socialismaj urboj k problemo de l' nova familio

Soveta proleta ŝtato eniris jam tian stadion de sia malvolo, ke problemoj de socialisma rekonstruado de la socio el sfero de teoriaj supozoj pri malproksima estonto transiris en sferon de konkretaj inĝenieraj projektoj. Kelkajn el ĉi tiuj projektoj oni jam komencas efektivigi en vivo. Ĉirkaŭ novaj industriaj gigantoj, kiel Dneprostroj, Stalingrada Traktorfabriko, Magnitmonta metalurgia · centro estas konstruataj socialismaj urboj, kiuj radike distingiĝas de l' ĝisnunaj urboj.

Tio estas nur unuaj ĝermoj de kreskanta socialismo. Sed post kelkaj jaroj, se la kapitalisma mondo ne provokos nin je milito, Sovetio kovriĝos per densa reto de tiaj urboj, kiuj laŭ sia aranĝo k vivo de siaj loĝantoj malsimilas urbojn modernajn.

Sur paĝo de sovetia gazetaro estas vaste pridiskutataj problemoj de ekonomio k vivmaniero en socialismaj urboj. En tiu diskutado krom sociologoj, ekonomiistoj, inĝenieroj, doktoroj, pedagogoj k aliaj specialistoj aktive partoprenas partiaj k sindikataj organizoj k amasoj de l' loĝantaro mem.

Tre interesa estas la problemo pri la nova familio. Jen kion oni parolas pri tio en "Informoj de Centra Plenumkomitato" — ĉefa oficiala organo en Sovetio. Socialismaj urboj donas al la virino plenan liberigon for de kuirejo k infanejo k alvokas ŝin egale kun la viro por produkta laboro k socia agado. Materia dependo de l' infanoj al la gepatroj k de l' edzino al la edzo malaperas. Familia ligo, kiel mastruma unuo, post sociigo de l' hejma mastrumo disfalas en siajn konsistigajn atomojn, denove kunmetiĝante el ili jam en pli grandan kolektivon de domo-komunumo. La familio, kiel ligo por edukado de infanoj, ankaŭ perdas sub si sian bazon k transdonas tiun funkcion al pli larĝa kolektivo. Teritoria izolo de l' familio en unu ejo malaperas, ĉar la edzo k la edzino disponas, kiel ĉiuj aliaj membroj de l' komunumo, apartajn ĉambrojn, k la infanoj estas dislokataj sendepende de ili en aparta ejo.

Neniuj ĵuroj pri fidelo ĝis la ĉerko aŭ iuj aliaj juraj devigkontraktoj, firmigantaj la familian ligon, jam nun ne estas postulataj ĉe ni.

Kio do restas de la malnova familio? Videble nenio, se ne kalkuli personan simpation k reciprokan alligitecon de membroj en la nova familio-kolektivo.

La rekonstruado de l' familia vivmaniero estas afero tre delikata. Tuja k plena sociigo de ĉiuj flankoj de l' vivmaniero en nia lando estas certe malutila utopio. Eĉ en novaj socialismaj urboj, kie en mastrumaj interesoj ni devas garantii socian nutradon k edukadon al infanoj je 100%, ni ne emas efektivigi tion en deviga ordo. Cetere estas dubinde, ke iu familio rifuzos uzi senpagan socian edukadon. Ni ne povas konstrui samtempe kuirejojn-fabrikojn k apartajn kuirejetojn por ĉiu loĝejo. Kontraŭ amatoroj de hejmaj tagmanĝoj, kuirfornetoj, kuiraj petrollampoj oni devas batali ne per malpermesoj, sed per bona organizado de sana k malkara socia nutrado. Ni opinias, ke por malgrandaj infanoj (ĝis 7-jara aĝo) estas preferindaj apartaj ejoj. Sed se iuj el la patrinoj de tiuj etuloj komence ne ekvolus forlasi ilin, kontraŭ tio oni povas apliki nur konvinkon.

Niaj infanhejmoj, lernejaj urbetoj k ceteraj edukaj institucioj neniuokaze estos fermitaj institucioj kiel tiuj en ĝisrevoluciaj tempoj. Eniro k eliro el ili ĉiam devas esti vaste malfermita por maturuloj k infanoj. Eduki infanojn izole de ĉio tio, per kio vivas k spiras tuta matura loĝantaro, estus malutila k reakcia utopio.

Konfidi la edukadon de infanoj de la plej delikata aĝo nur al dungitaj specialistoj de tiu ĉi afero, kiom ajn bonaj ili estus, ni ne povas. Konstanta kontakto de infanoj kun maturuloj devas okazi en la interesoj de tiuj k aliuj. Sed tio ĉi rilatas ne nur al kontakto de l' infanoj kun gepatroj. Certe por patrinoj unuavice oni devas garantii eblon ne nur veni al la infanoj, sed preni ilin hejmen dum libera tempo en kadroj de normala higiena reĝimo de tago k nokto. Sed krom gepatroj al edukado de infanoj devas esti allogataj ĉiuj sociaj organizoj de la Unio. Pioniroj estas certe plej naturaj organizantoj de ludoj k regantoj super animoj de l' Oktobridoj (infanetoj). Junkomunista Ligo devas preni sur sin similan rolon rilate al la pioniroj, la partio — rilate al la junkomunistoj.

Kompiltrad. S. B—v.

Se la aktivaj SAT-anoj
en sufiĉe granda nombro renovigus sian
aktivan membrecon
en tiu ĉi monato, ni baldaŭ povus reeldoni
12-paĝajn numerojn de "S-ulo"!
NE PROKRASTU, K-DOJ! VARBU ANKAŬ NOVAJN MEMBRO-ABONANTOJN por la nova jaro! Estas tempo por agi!

oni memoru pri la menciita murdado de suraŭtomobilaj policanoj, kiuj nur por distri sin senĉese pafadis al senkulpaj homoj, *senkaŭze, ne provokite*. En tia policaŭtomobilo troviĝis kelkaj dekoj da homoj, k estas pruvite, ke multaj el ili, eble eĉ ĉiuj pafis. Oni pensu ankaŭ pri la menciitaj fitraktoj, multajn monatojn poste okazintaj parte al la malfeliĉaj arestitoj el tiuj tagoj, parte al aliaj kompatinduloj. Tian fitrakton en polica komisarejo de Vieno *ne* faras nur unu sola policano, sed multnombra aro, verŝajne ĉiuj, kiuj ĝuste ĉeestas, ĉiuokaze, laŭ la eldiroj de veramaj viktimoj, *multaj* policanoj. Krome oni pripensu la multegajn kazojn de cetera fikonduto de policanoj kontraŭ proletoj, ankaŭ ofte en la postjulia tempo de l' jaro 1927.

Konklude oni povas, eĉ kun plej granda objektivo k bonvolemo al multaj bonaj policanoj en Vieno, aserti, ke rilate la fiecon ne temas nur pri nemultaj "unuopuloj", kiel oni kutime diras tiaokaze. Tiuj "unuopuloj" estis *treege multnombraj*, k tio permesas konkludi, ke la elcento da fiuloj inter la policanaro de Vieno estas grandega.

Tiaj aferoj, kia la julia murdo, laŭ mia opinio koncernas ne nur la senperajn viktimojn, sed la tutan homaron, ĉar tie estas perfortitaj k fitraktitaj la du plej noblaj fundamentoj de l' homa socio: Justo k Vero.

Inspirate de tiuj vidpunktoj mi petas ĉiujn, kiuj legas tiun ĉi artikolon, parolante kun aliaj senkompate disbati la mensogon pri speciale abunda, aŭstra "Gemitlihkajt" (bonkora gajo). Al ĉiuj, kiuj estas atingeblaj por vi, ankaŭ al tiuj, kiuj intencas viziti Aŭstrion, rakontu la tutan veron pri la julia buĉado. Krom tio represigu tiun ĉi artikolon en kiel eble plej da nacilingvaj gazetoj, ankaŭ nesocialismaj, se ili ĝin akceptas. Tiel agante ni kunhelpos je la atingo de la celo: veko de la publika opinio, puno al la fipolica krimularo!

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

Internacia Asocio Biokosma

fondita en jaro 1926 de Feliks Monje *(Monier)*, konstatas, ke ne ekzistas individua estaĵo, ke ĉiuj moviĝantaj materiaj elementoj de la homa korpo eliris el fundo, kiu donas vivon same al ĉiuj estaĵoj, al kiu ili reiros post la malkuniĝo de nedaŭraj konstruoj, mineralaj, vegetaĵaj k bestaj, en kiuj ili estis miksitaj; opinias tial, ke ni devas konscie difini k praktiki la agojn favorajn por ke la individuoj profitu la harmonian kunagadon k la transirajn vivmanierojn en la Tuto. Ĝia celo estas la sistema studado de tiuj agoj. Ĝi eldonas 4-foje jare aperantan bultenon "La Universa Vivo". Por informoj sin turni al: K-do J. Estour, Kosmo, *Sollies-Pont* (Var), Francio.

TRA ESPERANTIO

Esperanto ĉe infanoj

"Ne, mi estas tro maljuna por lerni ankoraŭ esp-on, instruu ĝin al niaj infanoj." Kiom ofte mi jam aŭdis tiujn vortojn, propagandante por nia lingvo, k verŝajne ne nur mi, sed multaj aliaj Gek-doj varbemaj spertis similon. Aliaj diras: "Provu enkonduki esp-on en la popollernejoj" k celas la samon: esp-istigi la infanojn. Laŭ tiuj eldiroj nia lab. esp. grupo provis agi, adresante petskribaĵon al la magistrato, kiu "kompreneble" kontraŭis al enkonduko de esp. instruo en ĉi tiea popollernejo (malgraŭ plimulto de unu lab. partiano en nia parlamento). Dua skribaĵo estis same traktata. Ni decidis, ĉar la reprezentantoj de ŝtata lernejo ne ebligas al niaj lab. infanoj lerni esp-on, mem ekagi. Per flugfolioj direktitaj al la gepatroj ni atentigis pri komenco de infankurso. Sufiĉe da gepatroj sekvis nian alvokon k ni komencis du kursojn kun sume 42 geknaboj en la sindikata hejmo.

Tio estis en aŭtuno 1929. Kelkaj burĝaj instruistoj daŭre mokis en la lernejo pri la geknaboj partoprenantaj en niaj kursoj. La infanoj ĉiufoje rakontis al mi plej novajn aferojn. Ekz., se iu hazarde ne ĝuste sciis ion lernendan, la instruisto kutime diris: "Jen tia malsaĝulo lernas lingvon tute nenie parolatan k neniam bezonatan; — lernu unue vian gepatran lingvon." Similajn riproĉojn niaj lernantoj devis ofte toleri. Krome la instruistaro kritikis, ke mi kiel kursgvidanto tre verŝajne tute ne havas pedagogian talenton, estante nur 21-jara k ne ŝtate ekzamenita instruisto, "simpla" laboristo. Al knabino instruisto ekz. estis dirinta: "Se s-o P. komprenus ion, li certe ne akceptus vin malsaĝulinon." Tial ni perdis kelkajn gelernantojn, kelkaj forlasis la popollernejon, lernas metion k ne plu povas sekvi la kurson, aliaj perdis la intereson k emon (kio ja ne nur okazas ĉe geknaboj). Tiel iom post iom la aro malgrandiĝis. Montrante praktikaĵojn mi nun provas daŭre interesi la infanojn, por ke ili restu.

Mi aplikis la rektan metodon k progresas ĝis nun sufiĉe bone per ĝi. Malrapide, sed konstante k profunde ili antaŭenmarŝis en la lingvoscio; ni komencis ĉe la proksimaj objektoj, ekz. la ĉambro k ties enhavo k per bildoj (domo, magazeno ktp.). Por pli intimiĝi kun la infanoj, mi ekskursis kun ili kelkfoje en la "Saksan Svision", nian belegan montaron k kelkfoje iris en la arbaron dum la leciono. Krome ni komencis internacian korespondadon. Ni ricevis laŭ anonco en "S-ulo" el Sovetio k Aŭstralio kartojn k leterojn de tieaj infanoj, tiom multe, ke ne estis eble akcepti ĉiujn proponojn; poste ni interrilatis ankoraŭ kun kelkaj korespondemaj geknaboj el Amsterdamo. Precipan intereson trovis la unua letero el Aŭstralio, k multajn demandojn devis skribi la knabo, kiu estis komisiita respondi. Tiel la lingva scio pligrandiĝis, k kelkaj infanoj jam bone interparolas esp-e. Ili ricevas tute alian koncepton pri ĉiuj aferoj k certe fariĝos sennaciemaj k liberemaj homoj.

Malfacila por mi nature estas la instruado al infanoj, ĉar mi estas amiko



ne nur de l' ekonomia, sed precipe de l' persona libero, sekve kontraŭulo de *ĉia* subpremado k subordigo, k mi kompreneble ankaŭ ne volas subpremi infanojn. Ĉu eble ne estas subpremo, se mi devas devigi ilin daŭre silenti, ne interbabili pri aferoj verŝajne pli urĝaj por ili momente, sidi trankvilaj, ne interbatiĝi (kio ĉe buboj ne estas evitebla)? Sed mi nun estas sufiĉe kontenta pri la interrilatoj kun ili k provas kiel eble plej libere, sensubpreme instrui ilin. Nun funkcias unu grupo el 15 viglaj geknaboj en aĝo de 11—14 jaroj (vd. bildon!), kiuj certe restos fidelaj al nia movado.

Montrinte tiun ekzemplon, mi menciu demandon ĉi-rilatan. Ĉu estas pli bone enkonduki esp-on en popollernejoj (kiuj nur havas intereson eduki la infanojn kiel bonajn, obeemajn ŝtatanojn) aŭ mem aranĝi kursojn? Mi ĉiam pledis por "esp-o en la lernejojn", sed mi nun spertis, ke estas preferinde por nia movado mem instrui niajn infanojn k mem eduki ilin en vere libera maniero, for de la laŭŝablona edukado en ŝtatlernejoj. Kompreneble tiaj kursoj postulas grandan streĉon, multan tempon k ankaŭ amon al infanoj, sed ĉio estas bone rekompencata per pli realaj sukcesoj ol en ŝtatlernejoj. Ge-SAT-anoj, ne timu la penojn, agu tiel inter la infanoj k raportu al "S-ulo"! Nia devizo estu ne plu "esp-on en la popollernejojn", sed *ĝenerale "esp-on al la laborista infanaro!"*

SAT-ano 6707, Sebnitz, Germ.

KOMUNIKO DE LA DIREKCIO

En la n-o 318 de "S-ulo" ni jam sciigis, ke sekve de plendo de la Ĝenerala Sekretario de CK de SEU Drezen, kontraŭ la Direkcio pro ĝia artikolo aperinta en la n-o 310 de "S-ulo", ni metis je la dispono de l' Kontrol-Komitato la necesan dokumentaron por ke tiu Instanco povu juĝi, ĉu niaj diroj havis aŭ ne fundamenton. Hodiaŭ ni publikigas la decidon de la Kontrol-Komitato, ne aldonante ian ajn komenton.

Post lego de la letero de K-do Drezen[1] *k ekzameno de la dokumentaro metita je sia dispono, la K. K. decidas:*

per 2 voĉoj proponi la eksigon de K-do Drezen,

k per 3 voĉoj prezenti tiun eksigproponon antaŭ la venonta regula kongreso.

Kutime, okaze de eksigo, estas montrita la motivigo. Pro prihonora promeso ne liveri la nomojn de la akuzantoj[2], la K. K. ne povas prezenti motivigon detalan. Pro tio, ĝi ne povas unuanime proponi la eksigon de K-do Drezen, sed ĝi konsentas unuanime, ke ĝi estu prezentota antaŭ la venonta kongreso. Ni tamen devas akcenti, ke la hodiaŭa decido estas nur farita post la ekzameno de morala konduto de la interesito. Sed la K. K. nuntempe ekzamenas la konduton ĝeneralan de K-do Drezen (k de aliaj K-doj) rilate al la interesoj de SAT k kiu ricevos solvon per kolektiva decido pri ili.

La Kontrol-Komitato

L. Bergiers, H. Jeaneret, M. Van Aelst.

POR KOMPRENI LA INSIDON KONTRAŬ SAT

Kelkaj K-doj skribe diris: "Ni ne aprobas la militdeklaron de la C. K. de S.E.U. kontraŭ la sennaciismo, sed por konservi la unuecon de SAT ni pretas ne defendi tiun ismon." Tre laŭdinde! Sed eble tiuj K-doj ne scias, ke jam en la jaro **1923**, *la sama C.K. de S.E.U. faris similan militdeklaron. Eble la ĉi subaj citoj el la tiutempe eldonitaj presaĵoj de C.K. de S.E.U. helpos la SAT-anojn, kiuj vere deziras kompreni ĝuste la situacion en nia movado, ek-*

[1] Sen-data.

[2] Ĉar ili devenas el Sovetio k pro tio ke la skribintoj mem petis tion.

kapti la veran signifon de opozicia agitado:

"... SEU kondamnas ekskluzive *per*-esperantan karakteron de la agado de SAT, kiel falsan k kreantan miskomprenojn k komplikojn inter ĝia membraro. ... SEU ankaŭ kondamnas idealismajn principojn, kiuj estas ligataj kun la ideo de sennaciismo. ... Idealisma flanko de SAT forpuŝas de si ĉiujn komunistojn-marksanojn, kiuj ne povas ne vidi ĝian naivecon."

"Ankaŭ alia flanko de SAT-organizo kontraŭ-avertas la komunistojn: ĝia politika malprecizeco. Tio jam antaŭkondamnas ĝin al la disfalo aŭ plua reformiĝo. La kriterio pri klaskonscio de revolucianoj ne estas sufiĉa, ĉar en la praktiko anarĥistoj, social-demokratoj, estas pli danĝeraj malamikoj por la revolucia movado, ol la malkaŝa burĝaro... SEU álvokas ĉiulandajn komunistojn - esperantistojn subteni SAT, ĝi estos kreita pli taŭga por la komunistoj organiz-formo de internacia agado, samtempe senmaskante[1] idealismajn falsideojn de SAT k trudante al ĝi pli da vera praktikeco, pli da komunista influo."

"... Kompare kun SEU, gvidata de la komunistaro, SAT prezentas politike-neŭtralan organizaĵon, kies politike-ideologia neŭtralismo estas same kondamninda de la komunista vidpunkto, kiel estas kondamnata de SAT mem la apolitika neŭtralismo de esperantaj organizaĵoj ..."

Kaj kiel konkludo al la ĉi-supraj, kiel diri? — principoj eldiritaj de la C.K. de S.E.U. en la koncerna dokumento kun la dato m a r t o 1923, en alia dokumento, publikigita monaton poste je la nomo de K o m u n i s t a F r a k c i o de C.K. de S.E.U., estas dirite, post kiam oni konstatis "ĝian (t. e. de SAT — Red.) nebulan idealisman konceptaron, fakte fortirantan la aktivajn revoluciajn fortojn en la mistikan, reale tute ne fundamentitan, sennaciismon":

"Ni proponas:

"1. Dum la proksima kongreso de SAT — proklami aliĝon de SAT al Komintern, k peti la E.K. de K.I. pri laŭkonforma akcepto; sendi samtempe al E.K. de K.I. raporton pri la disvastiĝo de SAT, pri ĝiaj celoj, metodoj de la laboro, nombro de membroj ktp. ..."

Kiuj havas okulojn por vidi, orelojn por aŭdi k komprenkapablan cerbon, tiuj povas facile imagi pri kio temas en la tuta agitado de la opoziciularo. Nenio principe ŝanĝiĝis depost 7 jaroj. En tiu tempo, antaŭ la Kasela Kongreso, SAT jam estis ne ortodoksa organizo, kiun ĉiamaj ortodoksuloj volis konduki laŭ la nure ĝusta linio, — kiu nepre trapasi devas la sidejon de C.K. de S.E.U. en Moskvo! ...

Same kiel fiaskis la entrepreno en 1923, same ankaŭ ĝi fiaskos en 1930. SAT restos tia, kia ĝi ĉiam estis: senpartieca, senortodoksa organizo larĝe malfermata al ĉiuj prolet-esperantistoj, dezirantaj utiligi praktike esperanton por siaj klasaj celoj, kiel estas dirite en la statuto ekde la fondiĝo de nia Asocio.

* * *

"Oni informas: en frakcikunveno el komunistpartianoj k simpatiantoj, okazinta je 2. novembro en Berlino, k je kiu partoprenis Gek-doj Muravkin, Batta, G. Richter, M. Goltze, Dubiella, Kissler, Steinkühler, Alice Ottow k kelkaj aliaj, post akcepto de la decidoj de l' Moskva konferenco K-do Dubiella postulis tujan fondon de nova organizo, ĉar la konsekvenco de la nova gazeto ja tamen devas esti la skismo. Muravkin kontraŭis, ĉar ĝis nun la skismo-situacio ne estas m a t u r a."

[1] Ni ne korektis la lingvaĵon el tiu dokumento. — *Red.*

Nova abomenaĵo

"Estas menciinde, ke CK de SEU komencas eldoni novan gazeton "Internaciisto", kiel organon de l' opozicia parto de SAT-anoj. Se sovetiano sendinta monon al SAT per CK de SEU, sciiĝinte, ke la mono ne trafis SAT-on, postulas de SEU la monredonon, CK de SEU rekomendas aboni al "Internaciisto" k prokrastas resendi la monon.

"Ĉu ĉi tiu batalo kontraŭ SAT estas honesta, — juĝu SAT-anoj mem. Al singardemaj sovetianoj estas utile silenti. *SAT-ano el Ukrainio."*

LEGINTE LA KONGRESPROTOKOLON

Kiel okazas ĉiujare, mi ĝis antaŭ unu semajno senpacience atendis la anoncitan broŝuron enhavanta la protokolon de la X-a Kongreso de SAT (ĉar mi bedaŭrinde ne ĉeestis ĝin).

Estis por mi antaŭĝojo la penso, ke baldaŭ mi legos pri la — kredeble gravaj k fruktodonaj — laboroj de la Ge-SAT-anoj... Ho ne!... Mi ĵus legis tiun protokolon. Sed foriĝis mia ĝojo. La legado pri tio okazinta dum la 6 kongresaj kunsidoj estis por mi neklarigebla naŭzaĵo. Ĉu estas ja eble imagi, ke el la 6 kunsidoj de la Kongreso, la en Londono kunveninta Ge-SAT-anaro uzis 5 kunsidojn k duonon por diskutadi (mi preskaŭ skribis "diskutaĉi") ĉu pri personaj aferoj, ĉu pri similaj bagateloj?

Se ni ne atentos pri nia konduto dum nia ĉiujara kunveno, baldaŭ SAT-kongreso similos burĝan parlamentkunsidon, kies partoprenantoj ĉefe celas intrigi unuj kontraŭ la aliajn. La estontaj gekongresontoj bone pripensu tion, ke el diskutado — pli malpli akra — pri personaj aŭ pri bagatelaj aferoj nek SAT nek esp-o profitas. Ne ŝajnas al mi tre saĝe uzi tiom da tempo por diskuti pri raportoj, kiuj laŭstatute aperas en "S-ulo" antaŭ la Kongreso[1]. Oni aprobu aŭ malaprobu ilin. Poste oni pritraktu plej taŭgajn rimedojn por prosperigi SAT-on k esp-on.

Jam antaŭ 10 jaroj SAT fondiĝis k malgraŭ ĉiaj klopodoj ni ĝis nun ne sukcesis devigi la gvidantojn de proletaj movadoj — ĉu ekonomiaj ĉu politikaj — ke ili atentu la por la proletaro tiel gravan ilon — esp-o, k ni pasigas la kongrestempon interdisputante!...

Ĉiu el ni en sia lando plej laŭte krias al la proletoj, ke ili nepre unuiĝu tutmonde k dum niaj kongresoj ni ne povas mem unuiĝu! Gek-doj, ni pripensu, ni pripensadu tion.

SAT-anino 1380.

[1] Por tiuj, kiuj ne estas ĝuste informitaj pri ĉiuj postkulisaj aranĝoj, ni klarigu, ke Muravkin estas tiu, kiu ricevas la instrukciojn el Moskvo ...

FOR LA PARAZITEMO!

Sub tiu titolo en la n-o 318 de "S-ulo" K-do "Ekspluatito" plendas pri vizitantoj, kiuj devigis lin elspezi monon por la gastigo. Kiel rimedon por tion eviti, li prezentas la decidon de kelkaj K-doj, kiuj intencas forigi siajn nomojn el la Jarlibro. Tio malutilus la celon de SAT, ĉar se la ekzemplo estus imitata, nia Asocio malaperus aŭ almenaŭ malfortikiĝus.

La mondvagantojn ni devas malakcepti, sed pro tio ke la SAT-anoj devas koni unu la alian, almenaŭ nome, ni ne devas resti kaŝitaj. Indaj K-doj vizitis min, sed neniun mi gastigis, ĉar mono mankas preskaŭ ĉiam en mia poŝo. Tre volonte mi akompanis ilin tra la urbo por agrabligi ilian restadon k, ke ili foriris kontentaj, pruvas la leteroj de mi ricevitaj post ilia hejmenreveno. Al la vagantoj

[1] Ne tute ĝuste: ili aperas nur tre *resumite.* — *Red.*

Oni parolas tro multe pri aferoj, kiujn oni ne funde studis!

Jen aperis la

Protokolaro de la X.SAT-Kongreso en Londono

(3.–7. aŭgusto 1930),

kiu sur 84 denstekstaj paĝoj (Form. 15×22) havigas al vi tre klaran bildon pri la nuna situacio en SAT.

Ĉu vi jam legis ĝin?

Specialprezo: 0,50 mk. g. (sen plia membro-rabato!)

Administrejo de SAT, Leipzig O 27.
Sidejo de SAT, 23 rue Boyer, Paris XX.

mi lasis la bezonatajn minutojn por ripozi k ion manĝi. Poste mi akompanis ilin en gastejon finante en tiu ĉi punkto mian apogon. Iafoje mi pagis la noktrestadon, sed ne ĉiam.

Ni devas helpi tiun, kiu bezonas helpon, sed forpeli tiun, kiu intencas nin ekspluati. Atentu mian konsilon k restigu vian ŝatindan nomon en la Jarlibro. *E. A.*

Radio – Belgio

RESEF — soc. franclingva radio-disaŭdigo kun *esperanta traduko* okazas ĉiujaŭde je 20.45 h. (laŭ Grinuiĉ) per *Radio-Belgique* (ondlongo: 509 m, potenco: 1 kv.). Aŭskultantoj bonvolu nepre skribi (evtl. laŭdi pro uzo de esp-o) al RESEF, Maison du Peuple, 17, r. Jos. Stevens, *Bruxelles,* Belgio. (Ne forgesu citi "S-ulon"n!).

ESPERANTO K ITF

Je 19. oktobro vizitis 22 svisaj fervojistoj la sekretariejon de l' Internacia Transportlaborista Federacio en Amsterdamo. La iniciativo por tiu vizito devenis de la esperantistoj, k fakte la ekskurso havis realan valoron de poresp-a propagando. Malgraŭ plej bona volo de l Amsterdamanoj nur tiuj, kiuj scipovis esp-on, povis flue interkompreniĝi. Ĉe la akcepto en la sekretariejo K-do Nathans, sekretario de ITF, salutparolis en esp-o, same ĉe la vizito al la ejoj la klarigoj okazis en esp-o (k germana lingvo).

ĈE LA NEŬTRALULOJ

Esperanto estas enkondukita en la metiaj perfektig-lernejoj de Linz (Aŭstrio). Okazas 8 kursoj kun pli ol 350 gelernantoj. La kursoj daŭros kvin monatojn (ĉiusemajne unu leciono). Laŭ tiu iniciato verŝajne ankaŭ similaj lernejoj en aliaj aŭstriaj urboj sekvos la ekzemplon en Linz.

*

Samtempe kun 11 alilingvaj tradukoj aperos la aktuala libro pri la Andre (Andrée)-ekspedicio "Per balono al la Poluso" en esperanto.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Gracia, de *Kosecu Fuĵisaŭa.* Historia dramo, esperantigita de *M. Hata* k *T. Murakami.* 22 pĝ.; form. 13×18. Japana Esperanto-Instituto, Ŝin Ogaŭamaĉi III-15, Uŝigome, Tokio. Prezo: 0,70 sv. fk.

Dramo eltirita el la malnova historio de japanujo; ĝi okazis en Oosaka je la 17-a de julio 1600. Gracia estas la heroa edzino de la Daimio *Tadaoki* k, laŭ la moro de l' epoko, ŝi preferas la memmortigon al la malhonoro fariĝi garantiulino de *Gibuŝoo,* la malamiko de ŝia edzo.

Presiĝo bona; stilo korekta, k la vigla dialogo, malgraŭ kelkaj japanaĵoj, legiĝas facile. H. B.

Roseroj. Dua poemaro de *Adalberto Smit.* Eld. N. V. Joh. Ykema's Uitg. mij, La Hago, Nederl. 64 pĝ.; form. 11×15. Prezo: 0,75 guld.

Ĉu estas eble trovi legantaron por tiuj vere ne tre profundaj nek spritaj versaĵoj kunigitaj en tiu ĉi volumeto? Cetere, estas "bravaj" versoj, laŭ rimo k ritmo ne riproĉeblaj! Mi ne dubas, ke estis korbezono al Smit fari siajn rimojn, sed ĉu li sukcesos agordi la koron de leganto laŭe? — mi dubas. Bela preso, korekta lingvo. Nur la neologismo "dunkl(a)" (p. 57), evidente uzata anstataŭ "malhela, malluma", ŝokis min. N. B.

Amatora Iluziisto. Facilaj iluzioj fareblaj sen speciala aparato, priskribitaj en esp. stenografio *Duployé-Flageul* de *Magi Emulo.* 16 pĝ. Form. 10×16. Prezo: fr. 1,50 (1 resp. kupono). Eld. de Esp. Stenografio: 9, Bould. Voltaire, *Issy-les-Moulineaux,* Seine, Francio.

Biblioteko Nova Kulturo, La Amo de *P. Danov.* Burgas (Bulg., str. Car Iv. Ŝiŝman, 19). 26 pĝ.; form. 12×19. Prezo: 0,50 sv. fk. Perioda eldonaĵo de la sekto "Universala Blanka Frataro".

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Literary Guide, London, nov., Sanktulo eksigita (311); *The Rhyl Journal,* 8. 11., Sanktulo eksigita (311), resume; *Travail,* Lyon, 15. 11., Konsumkoop. movado en USSR (318); *Dachdecker-Ztg.,* Frankfurt, 16. 11., La homo k la maŝino; *Le Travailleur Alpin,* Grenoble, 15. 11., El Stalingrada letero (318); *Arbeiterstimme,* Dresden, 10. 11., Bandita agado en Usono (317), 30. 9., Sanktulo eksigita (311); *De Vrije Socialist,* Zandvort, 24. 9., La Lumo de Azio (310), El Aŭstralio, 5. 11., El Ukrainia esp. movado.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Solidarität, Brooklyn, okt.; *Signalen,* Stokh., 6. 11., 13. 11.; *Die Neue Welt,* Strasburgo, 5. 11.; *La Ligue,* Lyon, n-o 2; *Keramischer Bund,* Berlin, 1. 11. (sama artik. aperis en 6 germ. sindik. gazetoj); *Le Prolétaire,* Liége, 4. 10., 18. 10.; *Le Peuple,* Bruselo, 16. 11.

KORESPONDADO

BELGIO

K-do E. Weydisch, Rue Jourdan, 201, *St. Gilles-Bruxelles,* kun Gek-doj ĉl, pri vivo k laborkondiĉoj en ŝufarejoj.

FRANCIO

K-do C. Severius, Touwstraat, 22/I, *Antwerpen,* interŝ. PM per 100 aŭ 500 pecoj.

GERMANIO

K-do Herb. Damaschke, Karlsruher Str. 19, *Dresden-A. 40,* kĉl, L, PK, PM, ktp.

HUNGARIO

—20 Gek-doj koresp. pri ĉ. temoj kĉl, Adr.: Esperantistoj, Kossuth-Lajos — u. 11, *Kispest.*

K-do Georgo Lipeti, Báthory — u. 22, *Ujpest,* kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

JAPANIO

K-do Akio Kojama, Kaŭaramaĉi, Hirokooĵisagaru, *Kioto,* kĉl, PI, fotoj, afiŝoj k. a. ekspoziciaĵoj, nur pri prol. esp. k lab. movadoj.

NEDERLANDO

K-do W. L. Morsink, Memlingstr. 9, *Amsterdam, Z.,* kĉl, PM.

SOVETIO

K-dino Halino Melnik, Novosvetskaja 3, *Kazatin,* Ukrainio, kĉl, per belaj PI. Nepre k ĉiam resp.

—Viglan korespondadon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. t. kĉl. Adr.: Ukrainio. *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

HELPU!

Multaj Gek-doj (proks. 50) bezonas vian helpon por perfektigi sin en la uzado de esp-o. Gek-doj ĉiulandaj, skribu pri viaj vivkondiĉoj, bataloj politikaj ktp. Sendu L, PI, fotojn k. s. Senpacience ili jam atendas viajn koresp-aĵojn. Resp. garantiata. Skribu al peranto: K-do R. Ĉerper, Reichsplatz 4/II r., *Meissen/Sa.* (Germanio).

Atentu, Sudfrancianoj!

Kiu K-d(in)o povas havigi senkostan ĉambreton al, pro resaniĝo, vojaĝonta K-do? Informojn oni bonvolu sendi al Franz Flachberger, Kreutern 29, *Bad Ischl* (Aŭstrio).

SAT-ano 16 372

LETERVESPERO

Anglaj lernantoj deziras ricevi PK, PI ktp., por aranĝi sukcesigan letervesperon. Oni sin turnu: K-do H. Tingey, Grup-sekr., Bethnal Green Men's Institute, Bethnal Green Road, *LONDON, E. 2* (Anglio).

Por regula priservado al mezaziaj presrevuoj mi petas „labinkor-oj"n de la tuta mondo liveri al mi materialojn interŝanĝe kontraŭ primezaziaj korespondaĵoj. Ne forgesu ankaŭ pri salutleteroj, fotoj, propagandaj afiŝoj ktp. Dm. Albanov, *Taŝkent,* poŝtkesto 100, Turkestano (USSR).

K-do Vojtěch Vyskočil,

Praha-Ĉakovice 419, deziras korespondadon kun spertuloj en aviado, fotografio, meteorologio. Resp. garantiata.

FINNLANDO

K-do Onni Teräs, *Helsinki,* Sirkusk. 3 B 27, volas korespondi pri sporto, junsoc., soc. parti-temoj ktp. prefere kun anoj el Belgio, Francio k Anglio per angla, franca k esp-o. Prefere kun gejunuloj.

Kamaradoj en la tuta mondo atentu!

La membroj de *LEA-grupo München,* Bav., Germanio, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj pri ĉiaj temoj. Gek-doj, kiuj emas serioze korespondadi, estas petataj. Nepra respondo estas garantiita. Adresu ĉion: Al K-do *Ludwig Schlamp,* Lindwurmstr. 147, Rückgebäude I, *München,* Germanio.

NIA POŜTO

9877. — Artikoloj kun la titolo: "Se mi estus riĉulo" ne plu aperos. Sed ni ne komprenas, kial vi tiom povas ekscitiĝi pro kelkaj ironiaj frazoj.

16 743. — Tiurilataj broŝuroj estas elĉerpitaj laŭ niaj informoj. Germanlingvan broŝ. pri ido povus havigi al vi GLEA, Berlin.

15 043. — La desegno ne estis farita speciale por "S-ulo", sed reproduktita laŭ "El Sol" (Madrid). Ni akceptos ĉiam kunlaboraĵojn, se aktualaj k interesaj por tutmonda legantaro.

5323. — Ni publikigos vian artikolon, kun iomaj mallongigoj. *Red.*

ENHAVO

	pago
Pri la brazilia revolucio	73—74
El Islando	74—75
Pri la "balotoj" en Polio	75
Post la parlamentbalotoj en Aŭstrio	75
La klasbatalo tra la mondo . . .	76
Memoro je la 15-a de julio en Vieno	76—77
Socialismaj urboj k problemoj de l' nova familio	77
Tra Esperantio	78—80
Korespondado	80

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)